



Program-libro

SES 2015

Somera Esperanto-Studado



Martin, Slovakio
11.-19.7.2015




Salutvortoj

Jam la 10-a SES! Ĝuu ĝin plene!

Estimataj SES-partoprenantoj!

Estas tre agrable konstati, ke jam dekan fojon ni havas la eblon kaj honoron okazigi SES. La aranĝo dum la jaroj evoluas kaj iĝis jam „tradicia aranĝo“, kio ĝojigas kaj samtempe alportas respondecon kaj defion – fari ĝin ĉiun fojon pli kaj pli bona. Ni strebas okazigi aranĝon, kiu estu samtempe eduka kaj amuza – ja ne facilas tasko :) Tamen via partopreno konfirmas, ke ekzistas intereso pri ĉi-speca aranĝo. Ni elkore dankas al vi, ke vi decidis veni, riĉigi tiel la aranĝon – kaj efektive ja entute ebligi ties okazigon. Ni ankaŭ esperas, ke la aranĝo plu evoluos, pliboniĝos (kvalite, enhance, kvante) – pri tio ni bezonas vian helpon – partoprenu aktive la aranĝon, helpu al ni informi pri ĝi, venigu ankaŭ viajn konatojn ktp. Se vi interesiĝus pri kunlaboro rilate al SES estonte, kontaktu nin dum la aranĝo aŭ pere de: ses@ikso.net.



Persone mi ŝatus tre danki ĉefe al instruistoj (kiuj estas la plej grava parto de la instruista parto de SES) kaj ĉiuj aliaj (helpantoj, organizantoj, artistoj ktp.), kiuj kunkreas kaj ebligas tiun ĉi aranĝon.

Nepre diligente lernu ĉi-jare dum SES, ĉar en la jaro 2016 la aranĝo NE okazos! Ne timu, ĝi ne malaperos, sed post dek okazigoj ni faros unujaran paŭzon, kiu havas tre racian kialon: en 2016 okazos en Slovakio Universala Kongreso de Esperanto! La urbo Nitra gastigos tiun ĉi unikan, la tutmonde plej grandan renkontiĝon de Esperantistoj – kiu en Slovakio okazos post cent jaroj entute unuan fojon! Mi do esperas venontjare renkontiĝi kun plejmultaj el vi denove en Slovakio, ĉi-foje en Nitra, dum UK 2016! Kaj ni promesas, ke la aranĝo estos interesa, ja SES-teamo estos parto de la organizantoj :).

Mi do elkore invitas vin aliĝi al UK 2016, partopreni ĝin kaj praktiki tie la lingvon, kiun vi ĉe ni nun lernos :). Se iu el vi havus emon helpi pri UK 2016, volonte kontaktu nin, ĉiu mano (kaj kapo) estos bezonataj :). Kaj SES (ni esperu) re-aperos en Slovakio en 2017!

Fine nur deziro: ĝuu la aranĝon, lernu Esperanton kaj uzu ĝin – por tio ĝi ja estis kreita!

Peter Baláž (Petro)

E@I-kunordiganto, SES-organizanto



Už desiaty SES! Užite si ho naplno!

Vážení SES účastníci!

Je velmi příjemné vidieť, že už desiatykrát máme možnosť a česť, organizovať SES. Podujatie sa rokmi vyvíja a stalo sa už "tradičným podujatím", čo nás teší a zároveň prináša zodpovednosť i výzvu - urobiť ho zakaždým lepšie a lepšie. Usilujeme sa vytvoriť akciu, ktorá je súčasne vzdelávacia a zábavná – a to nie je ľahká úloha :) Ale vaša účasť potvrdzuje, že je záujem o takéto podujatie. Srdečne vám ďakujeme, že ste sa rozhodli prísť, obohatiť tým akciu - a vlastne umožniť jej vytvorenie. Taktiež dúfame, že sa SES bude ďalej vyvíjať, zlepšovať (kvalitou, kvantitou, obsahom) - z tohto dôvodu potrebujeme aj vašu pomoc - aktívne sa ho zúčastňujte, pomôžte nám informovať o ňom, privedte aj svojich kamarátov, atď. Ak máte záujem o spoluprácu ohľadom SES-u v budúcnosti, kontaktujte nás priamo na akcii, alebo pomocou: ses@ikso.net. Osobne by som sa chcel veľmi poďakovať predovšetkým učiteľom (ktorí sú najdôležitejšou súčasťou podujatia), ako aj všetkým ostatným (asistenti, organizátori, umelci a pod.), ktorí spoluvytvárajú a umožňujú toto podujatie.

Učte sa tento rok usilovne počas SES-u, pretože v roku 2016 sa podujatie neuskutoční! Nebojte sa, akcia nezanikne, ale po desiatich podujatiach si dáme ročnú pauzu, ktorá má veľmi racionálny dôvod: v roku 2016 sa na Slovensku bude konať Svetový kongres Esperanta! Mesto Nitra bude hostiť toto jedinečné, najväčšie svetové stretnutie esperantistov – ktoré sa na Slovensku bude konať po sto rokoch vôbec po prvýkrát! Takže dúfam, že budúci rok sa stretnem s väčšinou z vás opäť na Slovensku, tentokrát v Nitre, počas UK 2016! A sľubujeme, že udalosť bude zaujímavá, SES-tím bude súčasťou organizátorov :).

Preto vás srdečne pozývam prihlásiť sa na UK 2016, zúčastniť sa ho a precvičiť si počas neho jazyk, ktorý sa tu teraz s nami naučíte :). Ak má niekto z vás záujem pomáhať pri príprave Svetového kongresu v roku 2016, pokojne sa na nás obráťte, bude potrebná každá ruka (i hlava) :). A SES sa znovuobjaví (dúfajme) na Slovensku v roku 2017! Na záver už len želanie: užite si podujatie, učte sa esperanto a používajte ho – na to predsa bolo vytvorené!

Peter Baláž (Petro)


E@I-koordinátor, SES-organizátor

Organiza teamo:

Organizado de SES iĝas pli kaj pli temporaba kaj hompostula tasko :-). Ni tre ĝojas, ke daŭre necesas pligrandigadi la organizan teamon, ĉar multiĝas ankaŭ la aliĝintoj. Pri la aranĝo krom ĉi-sube menciitaj personoj kunlaboras pliaj homoj, al kiuj ni elkore dankas pro ilia diversspeca helpo.



Peter Baláž (SK)
ĉeforganizanto



Katarína Novotníčková (SK)
ekskursoj, vizoj, instruado



Dorota Rodzianko (PL)
financoj, administrado,
surloka helpo



Zuzana Kožuchová (SK)
akceptado, helpantino
(novuloj, ekskursoj ks.)



Matthieu Desplantes (FR)
kinejo, retpaĝaro, teknikaĵoj



Paulína Kožuchová (SK)
interpretado, helpanto



Vít Mišurec (CZ)
drinkejo



Michal Matúšov (SK)
koncertoj, teknikaĵoj



Léon Schnelldorfer (SK)
sporta kaj distra programo



Tomáš Stano (SK)
drinkejo



Anna Liszewska (PL)
posttagmeza programo



Alberto Muzzu (IT)
helpanto

SES 2014 en Nitra – komuna foto



Instruado / Instruistoj ☺

SES-organizantoj estas ĝojaj kaj fieraj povi prezenti al vi la plej grandan internacian instruistan teamon dum la (nuntempe) plej granda somera Esperanto-lernejo. Ĉi-foje ni havas unikan staton – dum SES 2015 instruos 12 instruistoj de 12 diversaj landoj! La instruistoj estas por SES la plej gravaj personoj – ili venas, por ke vi foriru de la aranĝo pli riĉaj je novaj scioj, por ke via Esperanto-nivelo signife kresku dum tiuj ok tagoj. Ni tre petas, obeu ilin, lernu diligente kaj pruvu al ili kaj al vi mem, ke ili ne venis vane :-). Por ke ni povu gastigi ilin ankaŭ dum la venonta SES!

Internacia teamo de spertaj instruistoj zorgos pri via lernado:

A1-nivelo:



Stano Marček (SK)



Victor Solé (CAT)

A2-nivelo:



Christophe Chazarein (FR)



Gražina Opulskienė (LT)

B1-nivelo:



Nina Pietuchowska (PL)




Peter Weide (DK)

B2-nivelo:




Tim Morley (UK)



Szabolcs Szilva (HU/PL)

C1-2 niveloj:



Konstantin Tikhomirov
Tikhomirov (RU/PL)



Bertilo Wennergren
(SE/DE)

Esperanto-literaturo kaj kulturo:



Nicola Ruggiero (IT)



Russ Williams (US/PL)



El la Zamenhofa-proverbaro:

- Lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon.
- Lernado sen fruktoj ne restas.
- Lerneja sekreto ne iru al gazeto.
- Lernu juna, por esti saĝa maljuna.

Priskribo de program-kontribuantoj

Rasmus Åkerlund

Mi estas de Svedio kaj momente volontulas ĉe E@I. Min interesas ĵonglado, partnera akrobatiko kaj dancado. Krome ŝatas mi la ideon de la baza enspezo.



Peter Baláž

Peter Baláž estas slovakia esperantisto kaj eldonisto loĝanta en Partizánske, kunordiganto de la edukprojekta asocio E@I (ekde 2005) kaj ĉeforganizanto de SES (ekde 2007) kaj KAEST 2010, 2012, 2014. Li estas estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio (ekde 2005) kaj kunfondinto de Wikimedia Slovenská republika (2012) kaj antaŭe aktivis en la estraroj de SKEJ kaj SKEF. Studis en Esperanto Interlingvistikajn studojn en UAM Poznan. Liaj ŝatokupoj: libroj, sci-fi filmoj, meditado, metala muziko. En la plebiscito de "La Ondo de Esperanto" li estis elektita Esperantisto de la jaro 2012. Nun li estas prezidanto de la LKK por UK 2016 en Nitra.



Marek Blahuš

Marek Blahuš estas ĉeĥa esperantisto kaj informadikisto (komputil-lingvisto). Li laboras en la Centro de lingva edukado de la Masaryk-Universitato en Brno (Ĉeĥio) kaj estas estrarano de E@I, kunfondinto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj vikipediisto. Li studis en Brno kaj Loveno (Belgio), en 2010-2011 li faris staĝon ĉe E@I en Nancio (Francio) kaj en 2011-2012 ĉe ĜD Interpretado de la Eŭropa Komisiono en Bruselo.



Christophe Chazarein

Christophe Chazarein eklernis Esperanton en 1998, kaj instruas ĝin de 2006. En 2009 li estis eŭropa volontulo por la Bjalistoka Esperanto-Societo kaj sekvis trejnadon pri Esperanto-instruado en la universitato de Poznań. Li gvidis plurajn kursojn interalie en la kastelo Grezizono (en Francio), kaj en SES. De 2013, li instruas ankaŭ la okcitanan lingvon. Li loĝas apud Tuluzo, sude en Francio.



Petro Chrdle

Petro Chrdle (*1946) estas origine inĝeniero pri elektrotekniko, doktoriĝis ĉe Instituto pri radioelektroniko kaj elektroniko de Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj en Prago. En 1992 li fondis Kongresan kaj klerigan agentejon KAVA-PECH kaj samnoman eldonejon. 1990-1994 li estis senata sekretario de AIS San Marino, 1987 ĝis 2010 komitatano de UEA, 1998 ĝis 2001 ĝia estrarano pri faka kaj scienca agadoj, 1987-1993 prezidanto de ĈEA, sekve ĝis 2011 ĝia vicprezidanto, ekde 2010 ĝis nun ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio. Ĉeforganizanto de KAESToj ekde 1998 ĝis 2008. Membro de muzea grupo de ĈEA respondeca pri internaciaj rilatoj de la Esperanto-muzeo en Svitavy.



Matthieu Desplantes

Matthieu Desplantes devenas de Francio sed loĝas en Slovakio ekde jaro kaj duono, kie li laboras ĉefe kiel programisto kaj tradukisto. Li interesiĝas pri lingvoj kaj lernis Esperanton en 2007.



La Teamo de Egalecen

Teamo de Egalecen: Manuela, Paulina kaj Rolando estas kunfondintoj kaj redaktoroj de la blogo Egalecen, kiu okupiĝas pri kontraŭdiskriminacio kaj socia justeco, ene de kaj ekster Esperantujo. Ili kunpretigis kelkajn programerojn por interkonatiĝi kaj diskuti pri tiuj ĉi temoj.

Sandor Horvath

Naskiĝis en Hungario, plenkreskis en Aŭstrio kaj translokiĝis al Aŭstralio en 1980. Jam ekde 1985 li loĝas en komunuma domo. Instruisto. Nuntempe li instruas rifuĝintojn kaj. . . li neniam posedis aŭton.



Don McIntosh

Mia nomo estas Don kaj mi venas de Otavo, Kanado. Mi estas emerito. Mi laboris en alta teknologio. Mi ŝatas biciklado, kaj mi estas membro de BEMI, tamen, mi nur subrigardas en tio nuntempe. Mi ankaŭ ŝatas danci, kvankam mi prenas ripozon de ĝi nun. Mi ŝatus fari escepto por vi personoj ĉe SES.



Les kaj Arlyn Kerr

Les kaj Arlyn Kerr estas emerituloj el Seatlo, Usono. Ili nun estas en la mezo de 19-semajna vojaĝo en Esperantujo kaj aliaj lokoj, precipe en Eŭropo. SES estas unu el ses renkontiĝoj en kiuj ili partoprenas dum la vojaĝo.



Elena Khusanova

Mi estas Elena de Ekaterinburgo, Rusio. Nuntempe mi loĝas kaj laboras en Partizánske, Slovakio kiel volontulo de E@I. Ĉefe mi laboras por E@I kiel grafikisto, ankaŭ tradukas retpaĝojn de E@I kaj helpas pri diversaj aferoj. Miaj fakoj kaj interesoj ĝenerale estas desegnaĵoj, fotado, arto, dizajno k.a. kaj kompreneble vojaĝado, diversaj ludoj, kelkaj sportumadoj.



Anna Liszewska

Anna Liszewska estas el Wałbrzych en Pollando. Ŝi studis la polan lingvon en Universitato en Vroclavo. Okde oktobro ŝi estas EVS-volontulo en oficejo de [E@I](#) en Slovakio. Ŝi ŝatas lingvojn, vojaĝojn kaj bakadon de dolĉaĵoj.



Rakoen Maertens

Mi estas studento de Psiĥologio ĉe Universitato Gento.



Stano Marček

Stano Marček estas slovaka esperantisto. Li laboras kiel redaktoro de revuo Juna Amiko kaj Esperanto aktuell, kaj antaŭe estis redaktoro de la revuoj: Revuo Esperanto, Esperantisto Slovaka, Esperantista Vegetarano kaj Heroldo de Esperanto. Jam antaŭe li verkis librojn (interalie proprajn kolektojn de krucvortenigmoj), nuntempe li ankaŭ mem eldonas ilin, interalie la lernolibron *Esperanto per rekta metodo*, kiu aperis en multaj tradukoj. En la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj li laboris kiel manaĝero de la sukcesa ĉeĥoslovaka muzika grupo Team' kiu kantis ankaŭ en Esperanto. En sia junaĝo li aktivis en la slovaka Esperanto-movado kaj gvidis kursojn de Esperanto, nuntempe li ekde 2010 estas prezidanto de SKEF (Slovakia Esperanta Federacio).



Michal Matúšov

Michal Matúšov estas slovaka esperantisto, komputikisto kaj muzikŝatanto. Li aktivis en kelkaj Esperantaj kaj edukaj organizoj kaj projektoj (ekz. SKEJ, E@I, ELiSo, Vikimedio Slovakio).




Tim Morley

Tim Morley loĝas en Britio kaj en la lastaj 15 jaroj instruis Esperanton, la anglan kaj la francan al infanoj kaj al plenkreskuloj. Li instruas B2-nivelan klason en SES.




Alberto Muzzu

Mi esperantiĝis, kiam mi naskiĝis, sed konscie en oktobro 2014, kiam laborante en la E@I-oficejo, mi lernis la lingvon. Mi studis ekonomion kaj lingvojn en la universitato, kie dank' al nestudado mi ankaŭ studis religion, filozofion kaj psikologion. Kaj nun mi daŭre volontulas en tiu stranga oficejo, kaj okupiĝas pri tradukado al la itala!



Katarína Nosková

Katarína Nosková estas dungito de Edukado@Interreto, kie ŝi laboras pri pluraj (ne nur por-Esperantaj) projektoj orientitaj ĉefe al lingvolernado. Ŝi studis instruadon de la slovaka, la germana kaj Esperanto, kaj estas aŭtorino de la unua retkurso de la slovaka por alilingvanoj www.slovae.eu.



Helen Palmer

Helen naskiĝis en Anglio. Ŝi estas devontiga mediogardisto, kiu ŝatas esti ekstere kaj protektas nian endanĝeritan naturon. Krom tio ŝi estas bona onklino kaj biciklemulino.



Nina Pietuchowska

Mi estas polino, kiu loĝas en Bjalistoko. Mi estis instruistino pri fiziko, kemio kaj Esperanto, nun pensiulino kiu havas pli multe da tempo por E-agado. Mi gvidis E-kursojn en diversaj landoj.

Mia hobbio: Esperanto, vojaĝoj kaj fotado.



Oleh Rohalskyi

Oleh Rohalskyi loĝas en Kievo en Ukrainio. Li dancas ekde 2008. Ekde 2010 li instruas dancon en Kievo. Liaj la plej ŝatataj genroj estas: popping, hip-hop, lockin, jerkin. Nuntempe li estas volontulo ĉe E@I.



Anna Skudlarska

Anna Skudlarska estas de Pollando, ŝi loĝas en Vroclavo. Inter ŝiaj hobbioj estas literaturo kaj tabulludoj.



Konstantin Tiĥomirov

Konstantin Tikhomirov (nask. 1988) estas devene ruso ekde 2009 loĝanta en Pollando. Li finstudis pedagogion (en Sankt Peterburgo, Rusio) kaj ĉeĥan filologion (Vroclavo, Pollando). Nuntempe li laboras kiel dogana administranto je importo al Norvegio kaj Svislando ĉe la transporta firmao UPS (en Vroclavo, Pollando). Konstantin fondis kaj gvidis studentan E-klubon "Aŭroro" ĉe Vroclava Universitato (2010-2013) kaj estris Silezian E-Asocion (2013-2014). Ekde sia E-aktiviĝo en 2009 li gvidis pli ol 20 E-kursojn en diversaj landoj (inkluzive de instruado ĉe SES-2012/13/14). Krom Esperanto li parolas la rusan, polan, ĉeĥan, slovakon, ukrainan, anglan kaj norvegan lingvojn kaj lernas/interesiĝas pri pluraj aliaj.



Václav Zouzalík

Mi estas studento de informadiko ĉe Masaryk-Universitato en Brno (Ĉeĥio), esperantisto kaj liberkultura aktivulo. Ekde 2007 mi volonte laboras en projektoj de Vikimedia Fondaĵo. Mi esperantiĝis en 2008 kaj en Esperantujo mi venis en 2011 (per SES).



Priskribo de programeroj

(Ordigitaj laŭ alfabeto)

La detalan programon kun ĝustaj horo kaj ejo bv. konsulti en la programtabulo!

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

Aligatorejo ☺



Aligatorejo estas loko (kaj tempo) kie (kaj kiam) vi povas praktiki aliajn lingvojn krom Esperanto. Fakte, paroli Esperanton kaj via(j)n denaska(j)n lingvo(j)n en la aligatorejo vi ne rajtas! La reguloj estas simplaj: vi skribas nomojn de la lingvoj kiujn vi parolas sur papereton kaj gluas ĝin al viaj vestaĵoj, por ke ĝi estu videbla al aliaj. Poste laŭ la paperetoj vi serĉas aliulojn kaj babilas pri io ajn. Vi ne devas scipovi multajn lingvojn – nur unu fremda lingvo krom Esperanto sufiĉas por ĉeesti.

Gvidas: Matthieu Desplantes

Anonimeco@Interreto

Ĉu vi scias kiel eblas kaŝaŭskulti aŭ identigi komputilon? Ĉu vi volas povi defendi sin antaŭ tiuj ĉi praktikoj? En la unua parto vi skize ekscios kiel funkcias Interreto, kiel krei bonan pasvorton kaj kiel kaŝiĝi inter amaso da retumantoj. En la dua parto vi ekkonos konkretajn progresintaj programoj por sinkaŝo ene de la Interreto. La prelegoj celas al komencantoj en komputila sekureco.

Prelegas: Václav Zouzalík

Aŭstraliaj Aborigenaj Lingvoj

Sandor Horvath donas superrigardon pri la Indeĝenaj lingvoj en Aŭstralio.

Vi ankaŭ lernos kelkajn Pitjantjatjara vortojn kaj frazojn.

Baza enspezo – filmo kaj diskuto

La hodiaŭaj socialasekuraj sistemoj estis konstruita por labormerkato, en kiu pli malpli plena dungiteco estis. Hodiaŭ ni ekde jaroj ne havis plenan dungitecon kaj verŝajne neniam denove havos. En tiu ĉi prelego vi aŭdos dekstrajn kaj maldekstrajn argumentojn por la baza enspezo. Vi aŭdos pri provoj en diversaj landoj kaj pri kie oni nun interesiĝas pri la ideo.

Gvidas: Rasmus

Ĉeĥio – historio kaj kulturo

Ekkonu la plej najbaran landon de Slovakio. Per rapida trarigardo de historio de Ĉeĥio eksciu kion ĝia historio influas ĝian nuntempon kaj eksciu pri kelkaj interesaĵoj, kiuj alilandanoj ne konas.

Prelegas: Václav Zouzalík



"Ĉio komenciĝis ĉe la Verda"

Ĉu ĉiuj esperantistoj ĉion scias pri L. L. Zamenhof, pri la regiono kaj urbo, en kiu li naskiĝis kaj vivis 14 jarojn? Bonvolu veni kaj kontroli. Eble estos novaĵoj por vi...

Prelegas: Nina Pietuchowska

Ĉu instrui kantojn en niaj Esperanto-kursoj?

Lernantoj en niaj E-kursoj ofte laciĝas post kelkhora laboro. Tamen, se la kursgvidanto fine de la leciono prenas gitaron aŭ eksidas apud piano, kaj instruas al la kursanoj belan Esperanto-kanton, ili vigliĝas kaj lernas plu: per amuza kaj gaja maniero ili parkerigas tekstojn de la kantoj. Nia gasto Stano Marček instruos al vi, kun gitaro, kelkajn Esperanto-kantojn, konvenajn por niaj kursoj, kaj montros al vi, kiel vigligi per kantado la instruadon.

Prelegas kaj kantas: Stano Marček



Ĉu nur Esperanto sufiĉas? (Aŭ kiel ŝanĝi la mondon)

La mondo ŝanĝiĝas – kaj ni ŝajne alproksimiĝas al la „turnopunkto“, kiu povas havi du direktojn – al la pli bona kaj malpli bona socio, ol estas la ĝisnuna. Nia tero urĝe bezonas daŭripovan evoluon – ĉu ĝi realigeblas? Ĉu eblas havi samtempe ĉiam pli modernajn telefonojn kaj puran naturon? Kion ni (homaro) pleje bezonas nuntempe? Kiun vojon elekti? Kion fari kun sia vivo? Kiel agi, por vere plibonigi la mondon? Ĉu nur lerni Esperanton sufiĉos por plibonigi la mondon? Aŭ ĉu ni devos aktivi en multe pli da kampoj? Diskuttrondo pri aktualaj problemoj de la nuna epoko – venu esprimi ankaŭ vian opinion!

Gvidas: Peter Baláž



Ĉu vi ŝatas fungojn?

Ĉu vi ŝatas manĝi, sed eble ankaŭ mem kolekti manĝeblajn fungojn? Ĉu vi konas ilin? Pri diversaj specoj de boletoj, kserokomoj, ĉampinonoj (agarikoj), laktarioj, ombrel-, tremol-, buter-, betul-, skvan- kaj fragil-fungoj, sed ankaŭ pri iamaj mikologiaj seminarioj de esperantistoj en Poprad mi volonte babilos kun la ĉeestantoj, prezentante fotojn sur ekrano.

Prelegas: Stano Marček

Danckurso ☺

Mi volontulis instrui dancadon, sed mi ne scias, kiajn dancojn Eŭropanoj jam konas. Mi aŭdis, tamen, ke Eŭropanoj estas pli bonaj dancantoj ol Kanadanoj aŭ Usonanoj. Mi dancis plurajn partnerajn dancojn en la estinteco, kaj mi kunprenos mian mp3-ludilon ŝargitan kun multe da muziko. Mi faros liston de ebloj, mi certas ke ni povos trovi dancojn por praktiki.

Gvidas: Don McIntosh

Desegnado de homoj ☺

Ĉiu scias kiel desegni homojn per du punktoj kaj krampo. Sed ĉu vi iam revis ne nur desegni iun abstraktan homon, sed atingi similecon inter desegnaĵo kaj desegnata homo? Aŭ eble vi ne scias por kio uzi kraĵonon? Tiam la kurso "Desegnado de homoj" estas por vi! Dum la kurso vi ekscios sekretojn, kiujn uzas pentristoj por desegni homojn. Lernante ilin kaj trejnante plu vi sukcesos rapide kaj bele desegni homojn, ĉu belan nekonatinon aŭ amikon aŭ familianon, iun ajn! Ne plu vi bezonos fotilon por havi memorojn pri iu homo! Venu al la kurso kaj malkaŝu vian talenton desegni!

Gvidas: Elena Khusanova



Diskuttrondo pri normoj kaj privilegioj

En diverseca internacia medio kiel Esperantujo estas grave konscii kaj agnoski kiujn normojn ni sekvas kaj privilegiojn ni havas. Ne gravas ĉu la temoj estas tute novaj por vi aŭ ĉu vi jam iom scias - ni ĉiuj pensos, lernos kaj diskutos kune pri ĉi tiuj konceptoj kadre de egaleco kaj socia justeco.

Gvidas: teamo de Egalecen

Don't say 'QUITE!' kaj The Joy Of Phrasal Verbs!

Du prelegetoj en Esperanto kun konsiloj por tiuj, kiuj devas uzi la anglan kiel internacian lingvon. La konsiloj validas egale por denaskaj kaj nendenaskaj parolantoj de la angla.

Prelegas: Tim Morley

Egalecen sin prezentas

Venu kunfesti la datrevenon de la blogo Egalecen kaj eksciu: kiuj, kio, kaj kial ni estas. Ni prelegetos pri nia blogo, respondos al demandoj, kaj kune ĝuos kukon, sukcon, kaj tiel plu.

Gvidas: teamo de Egalecen

Esperanto-literaturo

Ĉu vi ŝatas legi? Kaj ĉu vi legas E-verkojn? Aŭ vi pensas ke nenio interesa eldoniĝas en EO? Ĉu kaj kial estas bezonate legi E-literaturon? Kia estas estonto de la E-literaturo? (en la mondo de ciferecaj libroj sed same en la tempo de apenaŭa legado en plejparto de la mondo) Kiaj estas defioj de la verkado, tradukado kaj eldonado de E-literaturo nun? Venu diskuti la estonton (kaj nuntempon) de la E-literaturo – kune kun eldonistoj, verkistoj kaj legantoj.

Prezentas/gvidas: Peter Baláž



Fratoj Čapek kaj la termino roboto



La frat-duopo Josef kaj Karel Čapek estis en la dudekaj ĝis kvardekaj jaroj de la dudeka jarcento sendube la plej famaj ĉeĥaj intelektuloj. Ambaŭ agis en pluraj artaj disciplinoj, tamen Josef famiĝis precipe kiel pentristo kaj desegnisto (kvankam li verkis ankaŭ sukcesajn librojn) kaj Karel precipe kiel verkisto kaj ĵurnalisto. Ambaŭ "kulpas" pri la naskiĝo de la ĉeĥa termino robot por artefarita homsimila inteligenta estaĵo. Karel bezonis taŭgan terminon por sia nova sciencfikcia dramo R.U.R., sed neniu de li elpensita kontentigis lin; jen Josef elpensis la nomon sekve uzitan. La dramo

baldaŭ furoris en la tuta mondo, kaj kun ĝi disvastiĝis la termino roboto, kiu nun eĉ fariĝis faka termino en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo. La prelego koncize konatigos onin kun la vivo kaj verkaro de ambaŭ fratoj.

Prelegas: Peter Chrdle

Feminisma Verkado

Verkadsesio por inoj kaj homoj, kies genro estas almenaŭ parte ina, aŭ kiuj spertas misogenecon. Ni kune elektos temojn, verkos, kaj kiu komfortas povas kundividi.

Gvidas: teamo de Egalecen

GLAT-renkontiĝo

Ĉu vi estas GLAT-a (geja, lesba, ambaŭseksema, transgenra) kaj/aŭ kvira, kaj volas GLAT-umi esperante? En ĉi tiu kunsido ni konatiĝos, kundividos spertojn, kaj diskutos pri kiel aktivadi pri GLAT-aĵoj en Esperantujo.

Gvidas: teamo de Egalecen

Hiphopa danckurso ☺

Hiphopo naskiĝis en Usono je la fino de la jaro 1978. Tiel ĝi reprezentas stratan kulturon el nigrulaj kvartaloj de Novjorko. La hiphopa kulturo celis kunigi la kvin stratajn artojn de tiu epoko: diskĵokeadon, rompdancon, mur-pentraĵon (grafition), buŝ-ritmo kaj repon.

Gvidas: Oleh Rohalskyi

Hodiaŭa scienca psiĥologio


Psiĥologio estas scienco kiu multe ŝanĝis dum la pasintaj jaroj. Pluraj homoj havas malkorektan ideon pri la subjekto. Aliaj ne scias kiom interesa kaj utila psiĥologio estas. Mi provos disvastigi mian pasion por la fako per montri bonkvalitajn ekzemplojn de kiuj mi lernis.

Gvidas: Rakoen Maertens

Ĵonglado ☺

Ni provos simplajn ekzercojn sole, pare kaj grupe en kiu ni maksimume havas havas du pilkojn por persono. En la fino ni provos ĵongli tri pilkojn.

Gvidas: Rasmus Åkerlund



Karaokeo kun Teamo ☺

Karaokeo estas kantado, kiam la kantanto vidas antaŭ si sur ekrano la kantatan tekston, kaj

samtempe sonas la muziko. Estas oportune uzi tion por instrui – aŭ almenaŭ por amuziĝi. Mi dum dek jaroj profesie laboris, kiel manaĝero, kun la rokmuzika grupo Teamo (dum pluraj jaroj, laŭ la oficialaj enketoj, la plej populara muzika grupo en la tiama Ĉeĥoslovakio): organizis koncertajn turneojn (pli ol mil koncertoj, ankaŭ en Esperanto: UK en Brajtono, IJK en Kerkrade, SAT-Kongreso en Illertisen...), radiajn kaj televidajn intervjuojn, la laboron en studioj. En 1989 la grupo eldonis la albumon "Team en Esperanto" (Ora Team!). Dum la prezento oni povos ekscii ion pli pri la grupo Teamo, kaj "karaokee" kanti kun la grupo.

Gvidas: Stano Marček

Kiel fuŝi suŝi 🍣 ☺

Ĉu vi emas krei suŝion? Venu kaj helpu nin fuŝi malsamaj specoj da sushi! Ni kune lernos aŭ pasigos iom da tempo kreante ion kio espereble poste similos por gusto kaj aspekto al la tipa japana plado! Venu 🍣

Gvidas: Alberto Muzzu



Kurseto pri manlaboraĵoj ☺

Manlaboraĵoj ne estas enuaj, laboras ne nur viaj manoj... Vi povas babili, lerni kaj krei ion novan...

Gvidas: Nina Pietuchowska

Kurso de la slovaka

Daŭrigu lernadon de la slovaka lingvo (post unua leciono dum la „Lingva tago“) – konatiĝu kun „slava Esperanto“, kiel la slovaka estas foje nomata. Lerne la bazon de la plej kompetenta persono: gvidas aŭtorino de la unua multlingva ret-kurso por la slovaka (realigita de E@I): www.slovake.eu.

Gvidas: Katarína Novotníčková

A Á Ä B C Ĉ D Ď
DZ DŽ E É F G H
CH I Í J K L L' L'
M N Ň O Ó Ô P
Q R Ř S Š T Ť U
Ú V W X Y Ý Z Ž

Kurso de la rusa lingvo

La rusa lingvo apartenas al la slava lingvaro kaj estas ties plej granda ano. Ĝi estas la oficiala lingvo en Rusio, unu el oficialaj lingvoj de Belorusio kaj Kazahio. Ĝi estas uzata ankaŭ kiel unu el la laborlingvoj de Unuiĝintaj Nacioj. En la rusa lingvo ekzistas ampleksa literaturo kaj filmaro, ĝi estas unu el la plej vaste uzataj lingvoj en Interreto, cedante la unuan lokon nur al la angla. Se vi ne parolas la rusan sed volus gustumi ĝiajn sonojn kaj ellerni skribi en ĝia cirila alfabeto - nepre partoprenu en la 2-leciona minikurso de la rusa lingvo. Dum la 1-a leciono vi ellernos kiel legi kaj skribi ruse, dum la 2-a leciono vi akiros scion de bazaj frazoj kaj vortoj kaj kapablos saluti viajn ruslingvajn amikojn en ilia gepatra lingvo.

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Kurso pri Vikipedio

Ĉu vi volas helpi al Vikipedio, sed staras antaŭ la unua paŝo? Aŭ ĉu vi estas spertulo kaj simple ĝuas vikian etoson? Do venu kaj redaktu kun ni! Kunportu komputilon kaj emon, profitu plifacilitan redaktadon, demandu malfacilajn demandojn kaj spertiĝu pri praktika afero kun helpo de spertuloj.

Prelegas: Michal Matúšov

Krucenigmoj en Esperanto

„Instrua amuzo“ estis titolo de unu el la kajeroj kun kruc(vort)enigmoj, kiujn mi verkis kaj eldonis antaŭ multaj jaroj. Ĉu krucenigmoj vere instruas kaj amuzas? Probable jes. Asertas tion reagoj de legantoj de diversaj gazetoj, kie krucenigmoj aperas, kaj ankaŭ reagoj de tiuj, kiuj aĉetis iun el miaj krucenigmaj kajeroj. La malnovaj ne plu haveblas, sed jes ja la lasta: „107 krucenigmoj en Esperanto“ (ankaŭ sur KD, kun la solvoj). Mi konsilos kiel solvi (projekciante sur ekranon), kaj eĉ kiel mem verki krucenigmojn. Cetere: ĉu vi scias, ke krucenigmoj (kaj ankaŭ Esperanto mem) estas bona preventilo kontraŭ Alzheimer-malsano?

Prelegas: Stano Marček

Kuracaj plantoj

Ĉu kuracaj plantoj povas helpi al nia sano? Kiel rekoni kaj utiligi kreskaĵojn, ĉirkaŭ kiuj ni ofte preterpasas aŭ eĉ ilin surpaŝas? Tiujn kaj aliajn respondojn klopodos doni al vi la preleganto.

Prelegas: Stano Marček

La okcitana lingvo kaj ties sorto

La okcitana lingvo estas parolata sur teritorio, kiu kovras la sudan trionon de la franca regno, kaj ankaŭ partojn en Italio kaj Hispanio. UNESKO konsideras ĝin kiel grave endanĝeran lingvon, kiu probable malaperos post kelkdek jaroj se venos nenia politika interveno. Tamen, la okcitana estis unu el la plej gravaj literaturaj lingvoj en la mezepoka Eŭropo. Kiel ĝi trafis tiun nunan krizan situacion?

Prelegas: Christophe Chazarein

La vivo kaj verkoj de la fratoj Grimm

La fratoj Jakob kaj Wilhelm Grimm estis juristoj kaj lingvosciencistoj. Ili ambaŭ laboris kiel bibliotekistoj en Kassel, kaj profesoriĝis en la Universitato de Göttingen. Ili kolektis kaj eldonis popolajn fabelojn kaj historiojn. En Esperanto aperis Elektitaj fabeloj de fratoj Grimm (1906), kiujn tradukis el la germana lingvo Kabe (Kazimierz Bein, 1872 – 1959). La prelego pritraktos la vivon de la fratoj Grimm, iliajn verkojn kaj la fabelojn en Esperanto, kun projekciado de bildoj kaj aŭdigo de la specimenoj.

Prelegas: Stano Marček

Lidia Zamenhof, pli ol filino de sia patro

Mallonga prelego pri Lidia Zamenhof, ŝia rilato kun Bahaismo, ŝia Cseh-metoda instruado de Esperanto en Francujo kaj Usono, ekzemploj de tradukoj kaj verkoj, lastaj tagoj en la Varsovia geto.

Prelegas: Anna Skudlarska



Lingvaj kurs(et)oj ☺


Mardo estas dediĉita al lingva diverseco – tial vi povas tutan posttagmezon partopreni diversajn prelegojn kaj prezentojn de diversaj lingvoj – la elekto estos riĉa, ĉiu certe trovos ion por si. Krom “tradiciaj” naciaj lingvoj vi havos ankaŭ eblon konatiĝi kun tre interesa lingvo (aŭ ĉu pli bonus diri „lingveto“? :-)) Kurso de „tokipono“ al vi prezentos unikan amuzan lingvon, kreitan de Esperantisto.

Prezentos/Gvidos: diversaj SES-partoprenantoj

Minikurso de meditado

Kio estas meditado? Ĉu eblas facile lerni ĝin? Kiel ĝi rilatas al homa konscio? Kiel funkcias nia cerbo? Ĉu ni kapablas regi nian menson kaj atingi internan silenton? Ĉu estonte meditado estos deviga? Venu aŭskulti, diskuti kaj mediti :)


Gvidas: Peter Baláž



Origamo ☺

Origamio (折り紙), foje nomata origamo, estas tradicia japana arto de paperfaldado. Oni uzas paperfolion kaj faldas el ĝi figuron, sen tondi la materialon. La figuroj povas esti bestoj, (ankaŭ homoj), transportoj, abstraktaj figuroj, ktp... la vorto venas de la japana oru, faldi, kaj kami, papero. Kelkaj opinias, ke ĉi tiu arto disvolviĝis en la periodo nomata Edo (1603-1867), aliaj ke ĝi estis enkondukita en Japanion de germana instruistino dum Meiji epoko.

Gvidas: Oleh Rohalskyi



Paroligaj rondoj ☺

Ni rekomendas al vi ĉiuj partoprenadi ilin – se vi volas plibonigi vian lingvo-nivelon, ekzerciĝi pri komunikado kaj parolado en Esperanto, la paroligaj rondoj (ĉiuvespere) estas ĝuste por vi! Nepre kontrolu sur la program-tabulo la lingvo-nivelon kaj klason, en kiuj ili okazas!

Paroliga rondo de toki pona

Por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la lingveto tokipona okazos paroliga rondo. Bonvenaj estas parolantoj de ĉiuj niveloj. Ni esploros kion ĉion ni povas esprimi per nur 120 vortoj kaj ni ludos kelkajn ludojn en malsteĉita atmosfero.
jan ali tan ma ali o kama o musi o toki e toki pona! Homoj ĉiuj de ĉiuj landoj venu kaj ludu kaj parolu la tokiponan!

Gvidas: Matthias von Laer



Partnera akrobatado ☺

Konstruu homajn piramidojn kun la aliaj partoprenantoj. Ekzistas piramidoj por ĉiuj niveloj de sperto.

Gvidas: Rasmus Åkerlund

Popping – danckurso ☺

Popping estas strato danco kaj unu el la originalaj funkstiloj, kiuj venis de Kalifornio dum la 1960-1970. Estas bazita sur la tekniko de rapide streĉi kaj malstreĉi muskolojn. Ĉi tio dancisto faras senĉese al la ritmo de kanto en kombino kun diversaj movadoj. Tiu danckurso similas al la movadoj de roboto.

Gvidas: Oleh Rohalskyi

Problemoj de transliterumo kaj latinigo de la rusa lingvo

La rusa lingvo estas la plej vaste parolata slava lingvo. Kvankam ĝi tradicie uzas la cirilan alfabeton kiel sian ortografian bazon, ekzistis kelkaj provoj kaj aperadis multaj projektoj de latinigo de la rusa lingvo. En tiu ĉi prelego vi povos ekscii pli pri la nocioj "transliterumo" kaj "latinigo", aŭskulti pri transliterumaj sistemoj kaj latinigaj projektoj de la rusa lingvo en kunteksto de aliaj slavaj lingvoj kaj konatiĝi kun aŭtora projekto de latina alfabeto por la rusa lingvo. La prelego estis unuafoje prezentita dum KAEST-2014.

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Projektoj de E@I – 10-jara jubileo de agado



E@I ekde sia komenco antaŭenigas edukadon diversmaniere kaj diversforme - retejoj, aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj... En nuna momento venas tempo por eĉ pli da aktivecoj en tiu ĉi kampo kun plia profesiiĝo, oficiala rekonado kaj pli vasta kunlaboro. Prezentitaj estos la plej freŝaj atingoj kaj la plej aktualaj edukaj projektoj kaj sumigo de la agado de la lastaj 10 jaroj, ekde kiam [E@I](#) oficiale fondiĝis.

Prelegas: Peter Baláž

Radikalaj Manartaĵoj ☺


Eskapu de la lecionoj kaj paroligaj rondoj per malstreĉa artumado - pentrado, brodado, kudrado, skizado ktp. Se vi havas proprajn rimedojn, certe kunportu! Ni specife artumos pri radikalaj mesaĝoj, ekz. brodaĵo kun feminismaj frapfrazoj.

Gvidas: teamo de Egalecen

Raymond Schwartz

Franco, bankoficisto, bankdirektoro, Esperanta humoristo kaj satiristo, majstro de vortludoj, gvidanto de la famaj literaturaj Esperanto-kabaretoj "La Verda Kato" kaj "La Tri Koboldoj" en Parizo, poeto, verkisto kaj redaktoro de la sprita gazeto La pirato. Mi rakontos pri la vivo kaj verkoj de Raymond Schwartz, projekcios bildojn kaj prezentos al vi specimenojn el la verkoj La stranga butikoj kaj Verdkata Testamento.

Prelegas: Stano Marček



"Rekonu la lingvon!" (40 eŭropaj lingvoj) - lingva ludo kaj prelego

Ĉu vi kapablas distingi germanan lingvon de la franca aŭ hispanan lingvon de la rusa? Probable jes. Sed ĉu la latvan de la litova aŭ la norvegan de la sveda? Provu viajn kapablojn en la lingva ludo "Rekonu la lingvon" kaj aŭskultu pri facilaj rimedoj por rekoni 40 eŭropajn lingvojn laŭ specifaj literoj aŭ vortaspekto.

Gvidas: Konstantin Tikhomirov

Rektmetoda instruado de Esperanto

Ekzistas multaj metodoj por lerni/instrui lingvojn. Kiel la plej efika montriĝis la t.n. rekta metodo. Kio ĝi estas? Ĉu temas pri la metodo, per kiu nia patrino instruis al ni nian gepatran lingvon? Kiu sen tradukado kaj troa gramatiko instruis al ni rekte pensi en nia lingvo?

Dum SES Stano Marček gvidos rektmetodan paroligan kurson. En aparta prelego li prezentos sian riĉe ilustritan lernolibron „Esperanto per rekta metodo“, kiu aperis en 34 lingvoj, la didaktikan materialon, kiu akompanas la libron, kaj diskutos kun vi pri tio, kiel rektmetode gvidi Esperanto-kursojn.

Prelegas: Stano Marček



Rusa slango kaj fivortoj - netradukeblaĵoj.

La rusa lingvo estas ne nur poezie riĉa altnivela lingvaĵo de verkistoj kaj poetoj, ĝi posedas ankaŭ neimageblan kvanton da modernaj slang- kaj fi-fortoj, multaj el kiuj simple ne havas unuvortajn analogojn en aliaj lingvoj aŭ eĉ mankas en ili kiel nocioj. Se vi estas avida lingvemulo kaj vin ne angorigas troprudenteco - venu kaj mergiĝu en la oceanon de la rusa (fi)slango. Sed ne diru ke mi ne avertis vin pri la enhavo!

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Skrablo-ludado ☺



Venu kaj provu ludi la plej popularan vortan tabulludon en la mondo – skrablon (Scrabble). La reguloj estas tre simplaj – oni devas komponi vortojn (uzante tegoletojn kun literoj) kaj interligi ilin kun la jam komponitaj. Oni gajnas poentojn por ĉiu litero de komponita vorto. Ekzistas multaj lingversioj de skrablo. Ĉe ni oni povos ludi la rusan, polan, ĉeĥan, slovakon, litovan kaj, kompreneble, Esperantan versiojn de la ludo. Venu kaj vortumu!

Prizorgas: Konstantin Tikhomirov

Skribsistemoj de la mondo

Mi prezentos al vi la diversajn tipojn de skribsistemoj uzataj en la mondo. Kiel funkcias la ĉina skribmaniero? Kiel distingi la ĉinan de la japana? Kaj la korea? Kiajn skribmanierojn uzas baratanoj, tajlandanoj aŭ armenoj? Vi ekkonos la respondon al tiuj demandoj kaj multajn aliajn aferojn dum mia prelego.

Prelegas: Matthieu Desplantes

Slovakaj popolkantoj en Esperanto ☺

Ĉu vi ŝatas kanti kaj amuziĝi? Tiam venu lerni kun ni novajn kantojn en Esperanto, ĉu origine Esperantajn, ĉu tradukitajn el aliaj lingvoj. Bona maniero por lerni lingvon, amuziĝi kaj kunkanti :-)

Gvidas/Instruas/Ludas: Mária Minichová

Sonlibroj en Esperanto

Sonlibroj (laŭtaj libroj, aŭdlibroj) lastatempe tre populariĝis en la mondo. Kiu el ni ekzemple ne ŝatas aŭskulti fabelojn? La homan voĉon oni povas registri, aldoni muzikon aŭ kantojn, kaj eldoni sur kompaktdisko aŭ DVD. Tiun oni povas aŭskulti antaŭ ol (agrabla) ekdormi, dum hejmaj laboroj, en aŭtomobilo... Emfazinda estas la pedagogia valoro: aŭskulti kaj kompreni parolatan tekston,

lerni novajn vortojn, alproprigi al si belajn kaj modelajn vortturnojn en agrabla mondo de fabeloj, romanoj aŭ poezio. Voĉlegitaj libroj ĝis antaŭ nelonge mankis en nia merkato kun kompaktdiskoj. Stano Marček decidis forigi tiun mankon kaj rakontos al vi pri sia projekto.

Prelegas: Stano Marček

Trevor Steele - stila majstro de Esperanto romano

Sandor Horvath prezentas la verkadon de Aŭstralia verkisto Trevor Steele.

Unu tago en la vivo de mediogardisto - Helen Palmer

Helen estas mediogardistino kaj spertis multajn diversajn lokojn en Aŭstralio Nuntempe ŝi laboras kun Indiĝenaj homoj en la "mezo" de Aŭstralia. Helen klarigas la multajn diversajn taskojn de mediogardisto kaj samtempe vi vidos la tre diversajn pejzaĝojn de tiu vasta kontinento.


Prelegas: Helen Palmer



Uzi rolludojn por instrui: kial kaj kiel?

La rolludoj okupas ekde la 70aj jaroj centran lokon en lingvo-pedagogio. Ili estas potencaj iloj, precipe por ekzerci la parol-kapablon, kaj kontribuas starigi agrablan kaj viglan etoson en la grupo. Bone uzate, ili tre rapide fariĝos nepreterebla parto de via kurso! Rolludoj povas tamen iom timigi, kaj ne tiel facilas ilin ekuzi kun novuloj... Kio estas rolludoj kaj kiel uzi ilin en sia kurso?

Prelegas: Christophe Chazarein



Verda vivo – niaj manĝkutimoj

Ĉu “verda lingvo” havas rilaton al “verda manĝo”? Venu diskuti la temon pri vegetaranismo, veganismo kaj aliaj manĝo-kutimoj kaj vivo-filozofioj kiuj ekzistas, pri iliaj avantaĝoj, ebloj, kondiĉoj, defioj. Eble via vivo iĝos eĉ pli verda ol estis ĝis nun! :).

Prelegas kaj diskutigas: Peter Baláž

Wikipedio - filozofio de libera scio

Vikipedion vi certe konas kaj uzas - ĉu por studado, laboro aŭ libertempe. Sed ĉu vi scias, ke ĝin verkas homoj kiel vi? Wikipedio ne estas nur retejo - ĝi estas grava parto de tutmonda liberreduka movado. Nia celo estas disponigi scion al ĉiu unuopa persono kaj vi povas esti parto en tio!

Prelegas: Michal Matúšov

Vivo sur la domboato

Les kaj Arlyn loĝas en domboato sur lago en la centro de Seatlo, Usono. Bildoj montros kiel estas tiu nekutima vivo.

Prelegas: Les kaj Arlyn Kerr



Vojaĝo en la mondo de celiakiulo

Celiakio estas malsano de la imuna sistemo kaŭzita de reago al gluteno, proteino kiun pluraj cerealoj enhavas. Sed kia estas la vivo de celiakulo? Kiel ŝanĝiĝas la mondo de iu, kiu malkovras havi tiun ĉi malsanon? Kaj kion povas fari riaz proksimuloj por helpi, aŭ ne malhelpi?

Prelegas: Manuela Ronco



Ĉu vi jam scipovas la slovakon lingvon? Se ne, jen nia helpo por vi: www.slovae.eu estas projekto de E@I, kie vi povas senpage lerni la slovakon - ankaŭ rekte pere de Esperanto! La retejo funkcias en 12 lingvoj, volonte ĝin provu kaj utiligu viajn scipovojn de la lingvo eĉ rekte dum SES aŭ venontjare dum UK 2016 en Nitra :).

Vespera programo

Nacia vespero (12.7.) ☺

Dum la nacia vespero estas celo prezenti elektitajn partojn de tipa, regiona kulturo, folkloro. Ĉi-jare prezentos ĝin folkloro ensemblo de Peter Sarnovský. Ili ludos por vi tradiciajn slovakajn kantojn, plurajn ankaŭ rekte en Esperanto!



Medogustumado (12.7.) ☺☺☺

Regulaj SES-partoprenantoj jam tre bonas nian tradicion "Vingustumadon". Sed nun ni troviĝos en la tereno de medo-farado, ne vino! Tial do bv. akcepti nian inviton por gustumi la lokan, 100% biologian kaj tre bongustan medon, antikvan drinkaĵon de dioj kaj ankaŭ vikingoj, slavo kaj aliaj drinkemuloj :). Venu gustumi medon, de la loka produktanto.

Koncerto B&B (13.7.) ☺

"B&B", "Betulo kaj Bertilo" aŭ (duonŝerce) "La Instruistoj" estas Birke Dockhorn kaj Bertilo Wennergren. Ili muzikas kune de dek du jaroj, kaj koncertis interalie en Arkones, SES kaj NASK. B&B prezentos al vi aron da kantoj, parte origine Esperantaj, parte tradukitaj el diversaj naciaj lingvoj kaj rearanĝitaj por fluto, gitaro kaj voĉoj. Plejparte tio estas baladoj, kiuj rakontas pri kortuŝaj flankoj de la vivo: memoroj dolĉaj kaj amaraj, amo feliĉiga kaj malfeliĉiga, disiĝo, morto kaj multo alia.



Muzikumado de Gabo: Tonoj de la vivo (Slovakio) (13.7.) ☺

Temas pri medita-kuraca sidado kun uzado de vibrafono kaj tamburoj, kune kun diskuto kaj klarigo pri unuopaj solfeĝaj tonoj, iliaj efikoj kaj aplikado al vivo.

Internacia kuirarta festivalo (14.7.) ☺



Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno ekkoni la gustojn de aliaj landoj. Dum la internacia kuirarta festivalo vi povos senpage elprovi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Por sukcesa festivalo, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon / kukon / keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.).

Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj (aŭ ambaŭ), kiujn oni ne sukcesas aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de malsamaj gustoj.

Teatraĵo R.U.R. (15.7.) ☺

DOcela MAlé divadlo ("Tute malgranda teatro", mallonge *divadlo DOMA*) aperis en 1994 kaj ekde 2006 la ensemblon administras la Centro de kulturaj servoj en Svitavy (Ĉeĥio). Ĝi hodiaŭ havas 30 membrojn aĝantajn inter 12 kaj 25 jarojn. Ili ludas, kreas kaj aktoras en tri grupoj. En 2013 ili preparis version en Esperanto de la teatraĵo de Karel Čapek *R. U. R.*, kiun ili prezentos al vi dum SES 2015. Vi povas vidi videon de tiu teatraĵo ankaŭ en Youtube [ĉi tie](#).



Koncerto de Asorti (Litovio) (16.7.) ☺

Asorti estas familia muzikgrupo el Litovio. La grupo ofte koncertas en Esperanto-renkontiĝoj, ekzemple en Latvio, Germanio, Finnlando, Svedio, Hungario, Slovakio kaj Belgio. La repertuaro estas diversstila, enhavas kaj originalan E-muzikon, kaj tradukojn de popularaj konataj mondaj kantoj. Ilia koncerto certe kantigos kaj dancigos vin.

.....



Koncerto de Kaŝi (17.7.) ☺



Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) estas germana muzikisto kaj esperantisto. Li venas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas ĉe la bando [The living Music Box](#). Carsten kantas kaj ludas pianon. Lia kantaro enhavas proprajn kantojn kaj bone konatajn el la tuta mondo. Dum SES li mojosigos la korojn de la publiko per sia mikso de propraj esperantaj kantoj, internacia furora muziko kaj aliaj konataj Esperanto-kanzonoj kaj pere de sia markanta voĉo.

.....

Koncerto de Tabea (Germanio) (17.7.) ☺

Tabea el Germanio faros harpan koncerton. Tiuj, kiuj povis ŝin aŭdi dum la lasta JES povas konfirmi, ke la muziko belegas, ŝia talento estas vere unika kaj la koncerto indas je partopreno!

.....



Internacia vespero (18.7.) ☺

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantojn la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon :-)) prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Jam anticipe kontaktu gvidantojn pri la detaloj.

Adiaŭa vespero (18.7.) ☺

Lasta vespero de SES devas esti la plej bona! :-)) Des pli se temas pri jam la 10-a SES! Ni disdonos kelkajn premiojn, ne rajtas manki la SES-kanto, statistiko pri la aranĝo, adiaŭoj, dankoj kaj kompreneble – bonega etoso kaj loooonga amuziĝo lastnokta.



Pri la ĉi-jara SES helpas ankaŭ ses EVS-volontuloj el 6 landoj, kiuj nun laboras en [E@](#): Alberto (IT), Ania (PL), Elena (RU), Matthias (DE), Oleg (UA), Rasmus (SE). La volontulado ebligas unujaran spertiĝon en la organizo, dum kiu vi povas helpi al ĝi pri diversaj projektoj, laboroj, perfektigi sian Esperanton, lerni iom la slovakon, ekkoni Slovakion kaj vojaĝi al diversaj E-aranĝoj en la regiono.

Se ankaŭ vi interesiĝus pri volontulado en [E@](#), volonte demandu ilin pri iliaj spertoj aŭ kontaktu nin dum la aranĝo aŭ post ĝi ĉe: info@ikso.net



Aldonaj programeroj

Noktumado

Diskejo ☺

Dum pluraj noktoj atendas vin diskotekoj kun internacia muziko de diversaj muzikstiloj. Tuj apud drinkejo, en la diskejo vi havos eblon eluzi vian energion, se ajna restos al vi post la tuta tago :) Amuzemaj kaj dancemaj partoprenantoj, nepre venu kaj etosigu la noktan vivon dum SES!



Drinkejo ☺

Ĉiutage ekde la 13a ĝis la nokto nokto fin' estos malfermita la drinkejo kun bongustaj drinkaĵoj, kie vi povos pasigi vian tempon antaŭ kaj post la koncertoj, aŭ dum la tago, se vi enuus :) Afablaj drinkejestr(in)oj garantios la bonan etoson :)

Kinejo ☺



Preskaŭ ĉiutage estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj aŭ eĉ rekte dublitaj en Esperanto. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, dokumentoj, komedioj, scienc-fikcioj. Detala programo de la filmoprojekciado aperos en la program-libro de SES.

Filmejon prizorgas: Matthieu Desplantes

Gufujo ☺


Tradicia ejo de Esperanto-aranĝoj: teejo, kun eblo trankvile, en silento ĝui la etoson, babili kun amikoj, ripozi, gustumi teojn. Ĉu diskejo tro bruas por vi? Do jen la gufujo – la ĝusta loko por vi! Ĉi-jare ni iom eksperimentos: post aŭtomata kinejo pasintfoje ni proponas al vi „aŭtomatan gufujon“ ĉi-jare! Je via dispono do estos ĉio bezonata en Gufujo (teoj, akvo, kuketoj ktp.), kaj vi povos vin mem priservi kaj pagi sur volontula bazo. Ni kredas je boneco de SES-partoprenantoj! :) *Funkcias ĉiunokte, ekde ĉirkaŭ 22:00.*

Sportumado ☺

Dum la tuta aranĝo estas je via dispono diversa sport-ekipaĵo kaj eblo sporti. Senpage disponeblas: tablotenis, teniso, badmintono, piedpilko, uzado de sportejo. Aldone, rezervu tempon vendrede, dum la sporta tago! Bv. kontakti organizantojn aŭ viziti la organizan ĉambron, por ricevi tie la sportan ekipaĵon. *Prizorgas la sportan programon: Leon Schnelldorfer*

Ekspozicio „EVOLUO.!?“ ☺

Dum la ĉi-jara SES atendas vin denove eta ekspozicio – temas pri kelkdeko da diversspecaj bildoj, kiuj havas komunan temon – bildeton de „evoluo“, ĉiam iom modifitan. Ĝi estas traktita en diversaj formoj, de diversaj vidpunktoj. Foje pli amuza, foje pli pensiga aŭ ŝoka. Diversmaniere ĝi traktas aŭ esprimas opinion pri nia nuntempa stato kaj ebla estonta evoluo – ĉu en kampo ekologio, ekonomio, edukado ktp. La celo de la bildo-kolekto estas prezenti ĉi-maniere diversajn opiniojn de diversaj artistoj pri la temo de evoluo de homaro. La temon vi povos kun ni trakti ankaŭ dum SES, partoprenante prelegojn aŭ diskutojn pri tiuj temoj, aŭ simple babilante kun aliaj ĉeestantoj. Ne temas pri iu „serioza ekspozicio“ (plejmulto de la bildoj estas elŝutitaj de la interreto), sed pli pri provo atentigi SES-partoprenantojn pri nia nuna mondo kaj ties evoluo. Nia celo estas pensigi, kelkfoje amuzigi kaj diskutigi – ankaŭ tiaspecaj bildoj estis do intence elektitaj. Se iu el la bildoj hazarde iun ŝokus, ofendus, aŭ simile, ni petas anticipi pri pardono. Volonte informu nin pri via opinio pri la temoj de la bildoj, aŭ venu diskuti iun el la temoj dum la „Paroligaj rondoj“.



Libroservo ☺

Por ke la Esperanto-kulturo ne nur transvivu, necesas ĝin prizorgi kaj samtempe subteni. Ambaŭflanke helpas libroservo de eldonejo ESPERO dum tuta SES, inter 14:00 kaj 19:00. Venu do aĉeti Esperanto-varojn por: kleriĝi, lerni, amuziĝi, muzikumi, filmumi, vestiĝi... kaj samtempe por subteni la verdan kulturon :-). Atentu! Dum SES estos pluraj varoj rabatitaj, speciala SES-oferto nur 1-foje jare! E@I kaj ESPERO proponas ankaŭ kelkajn novaĵojn kontraŭ avantaĝa prezo. Profitu!

Koverta poŝto ☺


Aranĝu vian propran poŝtkeston ĉe SES! Prenu kovrilon, subskribu kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo. Pendigu ĝin sur la afiŝmuron kaj via komunikado kun aliaj uzantoj de SES povas komenciĝi. Vi povas skribi (lasi mesaĝojn) al aliaj partoprenantoj kaj ili povas skribi al vi. Bonega metodo, precipe por komencantoj, kiel komenci komuniki en Esperanto. P.S.: Bonvolu ne enmeti spamon :-)

Ekskursoj ☺

Tuttagaj:

1. Altaj Tatroj (27 EUR) ☺

Altaj Tatroj estas la plej alta montaro en Slovakio kaj en Pollando. Tatra nacia parko troviĝas en la nordokcidenta parto de orienta Slovakio ĉe la ŝtata limo kun Pollando. Samtempe ĝi estas la plej



malgranda montarego en la mondo, ĉar ĝi okupas nur 260 km². Ĝi estis formiĝinta de ekstrema altaĵa reliefo kiel rezulto de glacia aktiveco. El la vidpunkto de turismo en Slovakio ĝi estas la plej grava montaro. La setlejo Štrbské Pleso ĉe la lago Štrbské pleso fariĝis grava sporta centro, kie troviĝas ordigitaj spurejoj por skituristoj kaj ski-saltsportistaj pontoj. Ekde 1993 Tatra nacia parko (kune kun sia pola parto) apartenas al unu el kvar biosferaj protektitaj areoj de la programo UNESCO Homo kaj biosfero (MaB).

La ekskurso estos relative facila, sen tro komplika montgrimpado, kun belega panoramo al apudaj montoj. Tamen ni rekomendas pretigi komfortajn ŝuojn kaj esti preta marŝi ĉ. 10-13km. La itinero iros de la lago "Štrbské pleso" al la lago "Popradské pleso", kun halto en la simbola tombejo (memore al la turistoj, kiuj pereis en la Tatroj).

Štrbské pleso estas bela monta lago de glacia origino en la Altaj Tatroj en la setlejo Štrbské Pleso en Slovakio. Štrbské pleso estas glacio-kovrita dum ĉirkaŭ 155 tagoj dum jaro. Estas kelkaj hoteloj konstruitaj ĉirkaŭ la lago kaj turismaj vendejoj apude.

2. Bojnice – urbo, kastelo, bestoĝardeno (30 EUR) ☺

Bojnice estas ban-urbo situanta en meza Slovakio. La varmajn akvofontojn mencias jam dokumento j el la 13-a jarcento. En 1938 la banlokon aĉetis la mondkonata firmao Baťa, poste ĝi apartenis al la ŝtato kaj ekde 1995 ĝi estas akcia kompanio.

Historio de la banloko nedisigeble kuniĝas kun la kastelo Bojnice. Temas pri romantika kastelo, kun parte origina gotika kaj renesanca bazo. La kastelo aperas en multaj filmoj kaj ĉiujare okazas en ĝi la konata Festivalo de spiritoj kaj monstroj, ege populara ĉe infanoj. Nuntempe ĝi estas administrata de la Slovacia nacia muzeo. Sub la kastelo estis ankaŭ malkovrita kavernoj kaj en apuda granda parko kreskas la plej malnova arbo en Slovakio, proksimume 700-jara tilio.



Dum la ekskurso ni vizitos ankaŭ la faman bestoĝardenon. Lastatempe ĝi strebas orientiĝi al raraj kaj endanĝerigitaj bestospecioj – interalie la cerkopitekeno Roloway (speco de simio) kaj la antilopo Bongo.

Duontagaj:

1. Subĉiela muzeo kaj la urbo Martin (7 EUR) ☺

La ekskurso celos konatigi vin kun la urbo Martin (kie SES okazos) kaj kun la historio de Slovakio. Ni vizitos belegan subĉielan muzeon de slovaka vilaĝo, kiu estas la plej granda nacipriskriba ekspozicio en naturo en Slovakio. Ĝi montras bildon de tradicia popola konstrumetio, loĝado kaj vivmaniero de la loĝantoj de nordokcidenta Slovakio en la 19-a kaj unua duono de la 20-a jarcento. Sur la areo de 15,5 hektaroj troviĝas 143 objektoj (konstruaĵoj), el kiuj 22 viziteblaj ankaŭ de ene.

La urbo Martin (ĝis la jaro 1950 nomata Turčiansky Svätý Martin) estas distrikta urbo kun 60.000 loĝantoj situanta en la regiono Žilina en la distrikto Martin en nordokcidento de Slovakio. La unua skriba mencio devenis el 1264. La originala urbonomo kreiĝis laŭ la departemento kaj la patrono de la preĝejo. La komunumo urbiĝis en 1340. En 1861 okazis ĉi tie granda kunveno de slovakoj, kie ili postulis aŭtonomion ene de Hungario. La urbo havas grandan signifon por moderna historio de Slovakio. Ĉi tie funkciis unu el la unuaj tri slovakaj gimnazioj. Siajn sidejon ĉi tie havas la kultura institucio Matica slovenská kaj la Slovaka nacia biblioteko, kaj troviĝas ĉi tie ankaŭ Nacia tombejo.

2. Oravia burgo (18 EUR) ☺

La Oravia burgo estas unu el la plej belaj burgoj en Slovakio, situanta en la municipo Oravský Podzámok. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo kaj dominanta de ta tuta regiono Oravio. La unua skribmencio devenas de la jaro 1267, kiam la burgon akiris hungaria reĝo Belo la 4-a. Dum pliaj 300 jaroj ĝi restis reĝa fortikaĵo.

La ejoj retrovis praktikan uzon en 1868, kiam en la burga areo estis fondita Muzeo de la Oravia Kunposedantaro. Tiu muzeo do apartenas inter la plej malnovajn muzeojn en Slovakio. Ekspozicioj orientiĝas al loĝkutimoj de la mez- kaj novepoko, historio de arma tekniko kaj al arto de la unuopaj jarcentoj. La plej bela ĉambro, Kavalira salono, kune kun la burga kapelo estas tre ŝatataj okazejoj de geedziĝaj ceremonioj.



3. Burgo Strečno, urbo Žilina (18 EUR) ☺



Sep kilometrojn for de la urbo Žilina, romantika ruino de la burgo Strečno dominas super la rivero Váh kiel simbolo de iama feŭdala povo en la meza regiono Považie. Kvankam ĝi estas jam ekde tri jarcentoj ruino, daŭre konserviĝis arkitekturo montranta ĝian evoluon ekde gotiko ĝis baroka epoko. Post parta rekonstruo, ekde 1995 la ruino estas alirebla por la publiko. Inter daŭrajn ekspoziciojn en la loko apartenas forĝista metiejo, kie la vizitantoj povas konatiĝi kun specialaj iloj uzataj de forĝisto. La ruino estas administrata de la Považie-muzeo en Žilina. En 1994 oni registris ĉi tie scenojn de la usona filmo

Dragonheart (Draka koro).

Žilina estas la kvara plej granda urbo de Slovakio, centro de nordokcidenta Slovakio. Foje ĝi estas kromnomata "Perlo ĉe la rivero Váh". La unuajn urbajn rajtojn ĝi ricevis de la reĝo Andreo la 3-a ĉirkaŭ la jaro 1290. En la urbo vivis slovakoj kaj germanoj. La unua skriba mencio pri urba komunumo devenas de 1312. Gravega kultura memoraĵo estas Žilinská kniha (La Libro de Žilina) enhavanta aron de juraj preskriboj de la germana urbo Magdeburg, kiujn tiam obeis ankaŭ Žilina.

SES-kanto

Jen, tiuj kiuj jam ĉeestis, bone konas la neoficialan himnon de SES :-). Kiuj ne ĉeestis, tiuj povos ĉi-jare ĝin certe aŭdi kaj danke al la teksto sur tiu ĉi paĝo ankaŭ parkerigi kaj kunkanti ĝin dum la adiaŭa vespero:

SES-kanto (2009)

Ho mi tiome lacas
kaj la kapo doloras
pro la dumtutataga studado tie ĉi.
La vetero tro varmas
kaj preskaŭ mi larmas
kaj plej verŝajne estas same kiel vi.

Rekantaĵo:

Sed tamen ĝojas ni esti ĉi tie
por lerni diversajn lingvojn kaj la mond'.
Foje diskutas pri mondopolitiko kaj
ĝia signifo por nia estont'.

Ĉar la ejo tro grandas
homoj ofte perdiĝas
en la koridoraro de la multangula dom'.
Ĉar la vojoj ege longas
ni ofte forgesas
dum la voj' en kiu ĉambro okazas la studad'.

La manĝaĵo 'stas bona
senfrukta senlegoma
sed multe da blankaj farunaĵoj manĝas ni.
La trinkaĵoj tro dolĉas
kaj kolore ne plaĉas.
Prefere nur akvon de la krano trinku vi!

Ni tre volas danki
al la organizantoj
por la senlaciĝema laboro de vi.
Venontjare vi refaru
kaj denove invitu
komencantojn kaj lingvospertulojn tien ĉi.

Lasta rekantaĵo 2x:

Ĉar ege ĝojis ni esti ĉi tie
kaj kune vojaĝi al la sekva renkontiĝ'.
Liberec' nin alvokas kaj volonte ni sekvas
Per komuna vojaĝo espereble sen stopiĝ'.

Melodio: Suoma popolmelodio „Valso de Emma“

Teksto: Jonas Dalmose kaj Johannes Mueller

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

SES 2015 okazas sub la aŭspicio de:

- Ministro de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de la Slovaka Respubliko – Juraj Draxler
- Prezidanto de la Žilina-a memrega distrikto – Juraj Blanár
- Urbestro de la urbo Martin – Andrej Hrnčiar

Organizantoj de SES 2015:

E@I (Edukado@Interreto): www.ikso.net

SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo) <http://skej.esperanto.sk>

Subtenantoj de SES 2015:

UEA: www.uea.org ,

Urbo Martin: <http://martin.sk/> ,

Eldonejo ESPERO: www.espero.sk

Projekto *lernu!*: www.lernu.net




Ĉu veni ankaŭ venontjare somere al Slovakio? Nepre JES!
Por veni al UK 2016 en Nitra. Historie la unua Universala
Kongreso de Esperanto en Slovakio dum ties 100-jara
historio! Ne maltrafu la okazon partopreni la plej
grandan Esperanto-aranĝon en la mondo, la 101-an UK-n!
Detaloj: www.nitra2016.sk




Mapoj por SES 2015

De la stacidomo ĝis la SES-ejo:



SES-ejo:



Vysokoškolský internát
Novomeského 7
Martin, Slovakia

Námes

